

# BULTENO DE «BARCELONA STELO»

JARO I. — SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO» — JULIO 1912. — N<sup>ro</sup> 2

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88    ▪    Redaktoro : JOZEFO GRAU

---

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

---



## INTIMA DANKA FESTO ĈE «BARCELONA STELO»

La 20<sup>an</sup> de l' lasta Junio «Barcelona Stelo» regalis la grupon «La Rondo» per Intima festo, kiun partoprenis ne nur la membroj de ambaŭ grupoj, sed ankaŭ kelkaj grupanoj de «Badalona Stelo», kiuj malgraŭ la malfacilaĵoj rekontitaj ĉe la alveturo volis honori per sia ĉesto la feston de danko.

Je la deka vespere alvenis en la salonon la gegrupanoj de «La Rondo» kunportante sian belan standardon, kiun oni salutis per longaj aplaŭdoj. Ĉe la enirejo la ĉeestantinoj ricevis belajn bukedojn, kiuj ellasis en la aero agrablan parfumon.

La spirito de interfratiĝo flosinta en la aero de l' festo ĉe «La Rondo» fariĝis en tiu de «B. S.» realaĵo, kiu florigis en la lipoj de ĉiuj ĝojajn frazojn de amo.

Dancado komenciĝis. Multo da paroj de gedancantoj formigis la simblan *rondon*, per kiu estis komencata la festo. Valsoj, sardanoj, k. a. estis dancataj kun entuziasmo de la belaj samideaninoj kaj de ĝentilaj verdstelanoj.

La prezidanto de «B. S.» invitis ĉiujn iri en la salonon de la kafejo, kie okazis festeneto regalanta la ĉeestantaron. Ĝi prezentis tre belan aspekton, kiun niaj legantoj povos imagi per helpo de la gravuraĵo supre enpresigita.

Sro. Rey, je la nomo de «B. S.» dediĉis la okazantan feston al la tuta grupo «La Rondo», kiu tiel frate kondukis ĉiam kun ĉiuj aliaj esperantistaroj. Tiu ĉi intima festo — li diras — estas pruvo de la danko de «Barcelona Stelo» por tiu, kiun vi okazigis en via sidejo. Volu ĝin akcepti bonvole!

Post la aplaŭdado, kiu premiis la dediĉajn frazojn de Sro. Rey, la prezidanto de «La Rondo» Sro. Campdelacreu prezentas la sincerecon de «L. R.» kaj ĝian intencon honorigi la grupojn kunagantajn; tial ĝi organizis la feston dediĉitan al «B. S.» Li diras, ke «Barcelona Stelo» kaj «La Rondo» estas laŭŝajne du grupoj, sed ĉar ili deziras sincere unuiĝon, oni povas aserti, ke ili estas unu sola rondo. Li dediĉas al «B. S.» kelkajn laŭdajn vortojn, dirante ke ĝi estas fratema kaj bonorganizita esperantistaro. Kaj li finas, dirante ke por pli bone sin defendi kontraŭ maljustaj atakoj ĉiuj devas memori ke *unuiĝo estas forto*.

Tiujn ĉi lastajn vortojn akceptis la alestantoj per bruaj aplaŭdoj.

Sro. Forcada, provinca deputito, grupano de «B. S.» prezentas al ni sian admiron je tiu junularo adoranta kulturon, kiu ankaŭ scias feste amuziĝi, kaj sian gratulon al la esperantistoj pace laborantaj. Sprite li rakontas epizodon okazintan al li en Svislando, kiu konvinkis lin tute pri la utilo de Esperanto. Fine, li proponas al ni sian helpon laŭ eble plej grandan.

Sro. Gili, sekretario de «B. S.» legas aliĝojn de Sro. Carcereny, barcelona urbkonsilanto kaj de Sro. Serrats, kiuj bedaŭras sian devigitan foreston de la festo.

Sro. Rocamora, trinkis por la triumfo de nia sankta ideo, kaj dankante Sron. Forcada, stimulis lin, ke li influu por la atingo de nia totala venko.

Sro. Dalmau, parolis pri la bezono konscii la farotaĵon por senprokraste alveni al unuiĝo, kaj incitis ĉiujn kuraĝe laboradi. Li tostis por Dro. Zamenhof, Esperanto kaj plifortigo de nia nuna organizo.

Sro. Pujulá bedaŭris la foreston de Dro. Bremón kiu, se malsano ne retenus lin for, estus povinta paroli en la nomo de K. E. F. Li komencis sian belan paroladon, elmontrante sian ĝojon pro la reciproka festado, kaj konsiderante farebla la unugrupiĝon de la frate laborantaj barcelonaj samideanoj. Sin turnante al Sro. Forcada, alparolis al li pri tio, ke la reprezentantoj de la popolo, de tiu popolo kiu ĉiutage pli entuziasme akceptas la helpan lingvon, estas ĝuste kiuj povos kaj devas oficialigi Esperanton. Por pruvi tion li elvolvis kleran rezonadon pri movado filologia kaj interna ideo de Esperantismo, kiu gajnis al li ovacion. Li devis ree stariĝi kaj reparoli, dirante ke tiujn aplaŭdojn oni devas dediĉi nur al la Majstro.